

Monda demografia situacio, la vilaĝo Mondo
Claude Gacond, 131-a radioprelego, 1966.04.06 & 1966.04.09

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas Claude Gacond kaj Andrée Gacond.

En Svislando, kiel en ĉiuj ceteraj riĉaj landoj, la edukistoj eksentas la neceson prezenti al la infanoj la gravecon de la monda demografia situacio. Sed tiu prezento riskas resti abstrakta je la okuloj de la gelernantoj. Ĝi devigas al citado de grandaj nombroj, al konstruo de grafikoj, kiujn la infanoj ĝoje kolorigas. La cerboj apenaŭ estas tuŝataj, kaj la korojn ne atingas la kvazaŭ astronomiaj nombroj.

A.- Sur la Tero vivas 3,2 miliardoj da homoj, kaj en la jaro 2000 la monda loĝantaro superos verŝajne 6 miliardojn.

Cl.- Kion signifas tiuj nombroj eĉ por ni, plenkreskuloj ? Kaj por niaj infanoj ? Por simpligi kaj konkretigi la prezenton de la hodiaŭa monda situacio svisa instruisto, sinjoro Koch, reduktis la homaran loĝantaron al la skalo de vilaĝa loĝantaro. Ni ekzamenos hodiaŭ, kiel estas tiu vilaĝo.

A.- Prenu eble kraĵonon, ĉar ni citos nombrojn, kiujn vi eble ŝatos posedi.

Cl.- Tiu vilaĝo, kiu reprezentas la mondon, havas mil loĝantojn. Sur granda tabulo oni povas desegni mil hometojn, kiuj konkretigas tiujn loĝantojn. Se oni deziras, ke ĉiu infanoj posedu dokumenton pri tiu vilaĝo, unu desegnita homo povas reprezenti dek loĝantojn. Kaj nun jen nombroj, kiuj parolas : Nur 300 personoj havas blankan haŭton, la 700 ceteraj estas koloruloj. Inter ili centoj havas nigran haŭton, dum la aliaj estas flavuloj.

A.- La infanoj kolorigas tiujn loĝantojn. Ili skribas sian nomon aŭ komencliterojn sur unu el ili.

Cl.- Kaj la laboro plu daŭras. Ni rekomencas alian grafikon. Ni kolorigas nun la vilaĝanojn, kiuj kapablas legi : 700, kaj lasas 300 personojn sen koloro. Ili estas analfabetuloj.

A.- Ĉu estas la infanoj, sin demandas la gelernantoj ? Tiam oni povas kompari kun loĝantara statistiko, kie la homoj estas grupigitaj laŭ la aĝo. La infanoj, kiuj ankoraŭ ne havas la lernejan aĝon ne reprezentas 30 procentojn de la vilaĝa loĝantaro.

Cl.- Tiuj analfabetuloj estas plenkreskuloj. En tiu vilaĝo ili reprezentas pli ol la duono de la plenkreskularo. Jen la monda situacio. Nun alia grafiko povas reprezenti la kristanojn per 290 personoj.

A.- Do en tiu vilaĝo 290 personoj estas kristanaj, dum 710 apartenas al aliaj religioj : islamo, hinduismo, budhismo, ktp. La infanoj miras pri tio, multe pli, ol pri la ras-statistiko. Ili ĝenerale kredas, ke la tuta homaro estas pli malpli kristana. Ĉiu religiano emas grandigi la gravecon de sia religio.

Cl.- En tiu vilaĝo ekzistas 5 magazenoj. La varoj estas egale dispartigitaj inter la 5 magazenoj. En la montrofenestroj la infanoj desegnas la samajn objektojn. Jen la stranga situacio en tiu vilaĝo. La 200 plej riĉaj personoj havas por si 4 magazenojn. Kaj la 800 aliaj vilaĝanoj devas kontentiĝi pri la lasta 5-a magazeno.

A.- La infanoj trovas tion neĵusta. Tiam oni povas klarigi al ili, ke tia estas la hodiaŭa monda situacio.

Cl.- Se necese oni povas fari kelkajn aliajn desegnaĵojn. Tiuj grafikoj devas komprenigi, ke 200 personoj posedas 80 procentojn de ĉiuj varoj troviĝantaj en la vilaĝo, dum la 800 aliaj vilaĝanoj devas kontentiĝi pri la 20 restantaj procentoj.

Monda demografia situacio, la vilaĝo Mondo
Claude Gacond, 131-a radioprelego, 1966.04.06 & 1966.04.09

A.- La infanoj facile komprenas, ke inter la 800 vilaĝanoj multaj devas esti mizeruloj.

Cl.- Grafiko parolos pri sato kaj malsato. 340 vilaĝanoj manĝas ĉiutage je sia sato. Ni desegnas ilin dikaj. La 660 aliaj najbaroj : viroj, virinoj kaj infanoj devas ofte rigardi la dikulojn manĝi. Multaj el ili manĝas eĉ ne po unufoje tage. Kelkaj estas vivantaj skeletoj. Ĉiujare 2 vilaĝanoj mortas pro malsato.

A.- La infanoj ŝatas egalecon. Ili ne ŝatas tiun vilaĝan situacion. Ili trovas ĝin terure nejusta. Larmoj brilas en pli ol unu okulo.

Cl.- Ne necesas prezenti multajn bildojn. Unesko aŭ FAO senkoste donas kelkajn paroligajn fotojn. Ni prezentu ilin dirante : jen la malsataj najbaroj.

A.- Tiu leciono devas konduki la infanojn de riĉaj landoj al kompreno de sia respondeco.

Cl.- Oni rakontu al ili, ke la riĉaj vilaĝanoj ĝis hodiaŭ ne sentis, ke ekzistas danĝero por la vilaĝa vivo daŭre vivi en tiu maljusta situacio. Oni parolu pri la helpo al la malprivilegiaj landoj. Oni rakontu pri la urĝa neceso de tiu helpo kaj prezentu la laboron de junaj metiistoj, kiuj oferis unu aŭ du jarojn de sia vivo por servi en malriĉa lando.

A.- Oni ankaŭ montru, ke ne estas mono, kiu estas necesa, sed labor-helpo.

Cl.- La infanoj rapide kreskas. Post kelkaj jaroj niaj gelernantoj estos finintaj siajn studojn. Ili certe ricevos inviton servi dum unu jaro en subevoluinta lando. Ili eble tiam rememoros pri la milloĝantara vilaĝo kaj sentos sian respondecon. Sed se ni nenion entreprenas por informi la infanaron pri la monda situacio, tiam estas risko, ke poste ili respondos ne al la alvoko. Ne, mi ne havas tempon, ĉar mi devas aĉeti motorbiciklon aŭ aŭtomobilon, ĉar mi deziras viziti forajn landojn.

A.- En tiuj vojaĝoj ili renkontos mizerulojn. Sed ili ne estos konsciaj pri la nenormaleco de tiu situacio.

Cl.- Estas dum la infanaj jaroj, ke sin formas la personeco. La lernejoj prezentu al la infanoj ne nur belaĵojn pri la mondo, sed realaĵojn. En la esperanto-kurso oni parolu pri tiuj mondaj problemoj, anstataŭ paroli pri katoj, kiuj manĝas musojn. Kaj hejme la gepatroj instruu tion al siaj gefiloj, se ili konstatas, ke la lernejoj tion ne ankoraŭ faras.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude Gacond kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-